# E. ARMAND

# NIA INDIVIDUISMO

## ĝiaj dèpostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj

esperantigis D.C.

Broŝurservo de S.A.T.

ĉe

Cercle espérantiste de l'Agenais
* Laùte! * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 4 FF

E. ARMAND

# NIA INDIVIDUISMO

## ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj

esperantigis D.C.

Broŝurservo de S.A.T.

ĉe

Cercle espérantiste de l'Agenais
* Laùte! * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 4 FF

La liberecana penso ĉe SAT-Broŝurservo,
"Cercle espérantiste de l'Agenais", F 47340 Laroque :

****************************************************

La liberecana penso (citaĵoj)
Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj (Malatesta)
La Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)
Civila Malobeemo (HD.Thoreau)
Etiko I (Kropotkin)
Eduko kaj vivsignifo - Fronte al la Vivo (Krishnamurti)
Individuismo en Antikveco - Individuisma Manlibreto -
La Aperoj de Ahasvero - La Kvina Evangelio - La Veraj
Interparoloj de Sokrato (Han Riner)
La Parlamentisma Iluzio (C.A.Laisant)
La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)
Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura) + En anarkista
socio (J.Grave)
Memvola Servuto (La Boétie)
La Piramido de l'Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)
Revolucia registaro - La Pariza Komuno (Kropotkin)
La liberecana socio (Bastien)

La Liberecana Frakcio de SAT, ĉe Pelle Persson,
Svartviksvägen 14, S 123 52 FARSTA, eldonas sian
organon : "Liberecana Ligilo".

Vi iam deklaris al mi, ke vi estas "individuisto". Ĉu vi povas pli ekzakte informi min pri tio, kio estas kaj kion volas la individuistoj. Mi konas plurajn personojn elstarajn, konsiderindajn, ordenitajn, kun altaj funkcioj, kiuj egale sin deklaras individuistoj. Iliaj parolo kaj konduto tamen ne similas la viajn. Kion el tio mi konkludu ?

Fakte estas Individuismo kaj Individuismo, samkiel estas lignofasko kaj lignofasko. Ekzistas Individuismo burĝa, karierista - Individuismo por privilegiuloj kaj monopolistoj, kiu havas nenion komunan kun la nia, kiu lasta estas kontraŭa al la via. Por vivteni sin, por prosperi, por atingi siajn celojn, la burĝa Individuismo - la Individuismo karierista - sin apogas sur la aŭtoritato de l'homo aŭ de l'socia medio sur la homo, kaj la ekspluatado de l'homo fare de l'homo aŭ socia medio, uzas por tio la taŭgajn eduk- kaj ag-metodojn, sin helpas per la instituciojn, kiuj ilin subtenas.
Ni, anti-aŭtoritatuloj, estas negaciistoj, kontraŭuloj de la aŭtoritateco kaj ekspluatado, kiu ajn ilin praktikas. Ni estas individuistoj an-arkiistoj - individuistoj anarkiemaj, se oni volas. La vortoj neniel ŝanĝas la aferon. Por ne plilongigi terminon jam sufiĉe signifovastan, ni ĝin senbalastigas je akcesoraj epitetoj, kaj ofte tutsimple uzas la terminon <u>Individuisto</u>.

Utilas, preterpasante, rimarkigi, ke la substantivo <u>an-arkio</u> vekas, etimologie, nenian ideon pri atenco, perforto, ekonomia organizo, diktaturo de socia kategorio. Ĝi estas grekdevena vorto, kiu signifas foreston aŭ negacion de aŭtoritato politika, registara, administracia, kaj pliampleksige la instituciojn, kiuj reprezentas tiun aŭtoritaton.

El tio, kion vi ĵus diris al mi, mi komprenas, ke via Individuismo komplete diferencas de tio, kion vi nomas burĝa Individuismo. Ĉu vi povas mallonge klarigi al mi, en kio ĝi konsistas ?

Ni signas per "Individuismo" ian vivkoncepton de homoj, kiuj donas la unuan lokon, la esencan lokon al la "individua fakto" - nome, kiuj konsideras la aŭtonomion, integrecon, netuŝeblecon de la homa persono - de la Individuo - viro aŭ virino - kiel la bazon, la ekzistopravon kaj la celon de la rilatoj inter la teranoj, kie ajn ili loĝas kaj kiu ajn estas ilia raso.

Via difino distingiĝas per sia mallongeco, pri tio mi konsentas. Tamen, ĝi ne komplete kontentigas min. Ĉu la Individuismo - la via - estas partio ? Kiel tia, ĝi devus prezenti programon, formuli distingajn depostulojn, advokati pri reformoj, modifoj, transformoj de la socia vivo destinitaj por starigo de aferstato, ebliganta la realiĝon de tiu programo. Ĉu vi povas diri al mi tion, kio reale estas pri tio - liveri al mi, ekzemple, liston de la individuistaj depostuloj ?

"Nia" Individuismo ne estas partio. Mi ĝin ĵus difinis kiel apartan koncepton pri la homa vivo. Ĝi do povus prezenti aŭ formuli nenian programon rekomendantan agadon cele al ekposedo de la ŝtatpovoj, al administrado de la aferoj. La Individuistoj laŭ nia maniero ja scias, ke la socia organizo kaj nuntempa politiko pleje rezistas al la realiĝo de ilia vivkoncepto. Estas do por ili relative facile prezenti liston de depostuloj, kiuj estas kvazaŭa komentario oportuna kaj vivanta de la Individuisma difino, kiun mi ĵus indikis al vi. Mi neniel kredas elĉerpi en la sekvanta prezento ĉiujn individuistajn depostulojn - ĉiujn "konkretigojn" de la aspiroj de niaj kamaradoj. Certe iuj estas preterlasitaj, kaj mi ne povas aserti, ke ili estus sammaniere formulitaj de ĉiuj, kiujn ni rigardas kiel la niajn. Tamen, tiaj, ili reprezentas la ĝeneralan tendencon de "nia" Individuismo ; ili klarigas, kiel ni situas fronte al la par-

tioj kaj aliaj konceptoj pri la homa vivo. Tiu prezento sufiĉe ekzakte raportas pri nia sinteno kaj nia propagando ĝenerale.

Do la individuistoj, kiaj estas ni DEPOSTULAS POR LA INDIVIDUO - VIRO aŭ VIRINO IZOLITA aŭ ASOCIITA - tuj kiam li havas la aĝon sin determini mem, kaj tio SEN ia limigo aŭ brido :

Plena kaj totala povo sole konduti, nome evolui, disvolviĝi, laŭplaĉe eksperimenti - laŭ la instigoj de sia temperamento, siaj pripensoj, aspiroj, volo, persona determinismo ; unuvorte, raportante nur al si mem pri siaj faroj kaj agoj ;

Plena kaj totala povo de esprimado, profesio, diskonigo kaj publikigo de la penso aŭ opinio - skribe aŭ parole - publike aŭ private ;

Plena kaj totala povo de posedo nenuligebla kaj definitiva de la produktrimedo (ilo, instrumento, mekanismo, maŝino, grunda aŭ subgrunda parcelo, ia ajn produktada aparato) totale aŭ parte. Kaj de memdispono pri la rezulto de la produktada klopodo - strikte persona - alidirite pri la produktaĵo. Sekve plena kaj totala povo interŝanĝi la diritan produkton, ĝin cedi senpage aŭ kontraŭpage, iel ajn ĝin transdoni ;

Plena kaj totala povo de memdispono pri la individua havaĵo, nome pri ajnaj utilaĵoj akiritaj per la persona produktado (la produktrimedo kaj la loĝdomo enkalkulitaj en tiu havaĵo) ;

Plena kaj totala povo de okupado kaj valorigo de ĉia loĝejo aŭ tereno neloĝata aŭ neokupata, aŭ kiun la okupanto ne povas valorigi sen aliulon ekspluati ;

Plena kaj totala povo de determino por kaj per si mem de siaj moroj ĝenerale, kaj de sia vivo korinklina, sentimentala, seksa aparte ;

Plena kaj totala povo de prezentado pri ĉia koncepto, doktrino, teorio, formulo, instruo - ekonomia, filozofia, scienca, literatura, arta, eduka, pedagogia, distra, religia, higiena aŭ ia ajn. Plena kaj totala povo de provo, realigo, apliko de la diritaj koncepto, doktrino,

ktp... - de la metodoj kaj sistemoj, kiujn ili povas naski ;

Plena kaj totala povo vivi izolite, "ekstere", pretere de ĉia grupo, de ĉia asocio, de ĉia medio. Plena kaj totala povo de konstituo de la paro, de la plurmembra geedzeco, de medioj patriark- aŭ matriakformaj ; de plurhomaj interakordoj cele al komuna vivo surbaze de striktaj afinecoj, rilate kiun ajn vidpunkton ;

Plena kaj totala povo de memvola asociiĝo sur ĉiuj kampoj, kie povas praktikiĝi kaj radii la homa aktiveco ; kiuj ajn estus la farendaj eksperimentoj, la atingendaj celoj ; - sur tereno ĉu ekonomia, ĉu intelekta, etika, seksa, dístra aŭ alia ajn ; - tiuj asocioj celu la produktadon, la konsumadon, la transport- kaj komunik-rimedojn, la garantion aŭ asekuron kontraŭ ajnaj riskoj, kiujn la homa estaĵo povas antaŭkonsideri dum sia ekzistado ; la funkciadon de instrumetodo aŭ eduksistemo ; la aplikon de scienca malkovro, la utiligadon de natura aŭ artefarita forto ; la deklaron pri ideo aŭ ties propagandon ; la realigon de ajna vivkoncepto individua aŭ enasocia ;

Plena kaj totala povo de federiĝo por la izolitaj individuoj, malmultnombraj grupoj aŭ ajnaj asocioj ;

Plena kaj totala povo partopreni en ĉia solidarago, akcepti kontrakton en kiu ajn branĉo de la homa aktiveco, por kiu ajn celo kaj por kiu ajn daŭro ;

Plena kaj totala povo forpuŝi ĉian solidaragon, nuligi ĉian kontrakton kaj por ĉia asocio disiĝi - ĉu antaŭavize, ĉu laŭ aranĝo ĉiukaze antaŭvidenda ĉe la starigo de la kontrakto aŭ Asocio ;

Plena kaj totala povo de traktado inter produktantoj kaj konsumantoj aŭ ĉiaj aliaj. Plena kaj totala povo de elekto de la animanto, iniciatanto, instrukcianto, komisiito, arbitracianto, profesoro, deponprenanto, stapl-anto, delegito - individuo aŭ asocio - kiu ajn estus la temo aŭ la objekto de la konfidita mandato ;

Plena kaj totala povo difini valoron por ĉia konsum-objekto, produkto aŭ utilaĵo. Variigi tiun valoron, ĝin debati, pridiskuti ĝian taksadon aŭ variadon. Vole sin turni al arbitracianto cele al determino de la dirita valoro. Aŭ difini nenian valoron ;

Plena kaj totala povo de stampado, emisio kaj cirkulado de mono, de laborkuponoj, ŝanĝokuponoj, biloj, kambioj transdoneblaj aŭ ne, nomaj aŭ pageblaj al portanto. Plena kaj totala povo atribui al ili ĉian liberigan valoron kaj ilin uzi por reguligo de transakcio se nur la dirita kurzo estas nek forcita nek deviga. Aŭ ilin rezigni, se oni tion trovas preferinda ;

Plena kaj totala povo de konkuremo aŭ de konkurenco, kiu ajn estus la agadbranĉo al kiu sin dediĉas la izolito aŭ asociito - kondiĉe ke li troviĝu en situacio tia, ke li povu disponi aŭ senrezerve profiti same de la eblaj okazoj lerni, koni kaj perfektiĝi, kiel de la produktrimedo, oportunaĵoj, translokado kaj reklamo.

Specialaj depostuloj pri la virino kaj la patrino.
*******************************************************

Plena kaj totala povo por ĉia virino - izolita aŭ asociita - gvidi laŭplaĉe sian patrinan funkcion, do eviti ĉian nedeziratan patriniĝon kaj tiucele uzi ĉian taŭgan metodon aŭ rimedon. - Ekskluziva kuratoreco de la infano ĝis tiu ĉi estos en aĝo decidi por kaj per si mem. Plena kaj totala povo por la patrino delegi tuton aŭ parton de tiu kuratoreco al ĉia individuo - viro aŭ virino - aŭ al ĉia asocio.

Specialaj depostuloj pri la infano.
**************************************

Plena kaj totala povo por la infano - knabo aŭ knabino - apelacii aŭ sin turni al arbitracio, aŭ por peti modifon aŭ ajnan transformon de sia kuratoreca stato, aŭ por postuli sian emancipiĝon - aŭ por ĉia alia motivo - la elekto de la arbitracianto aŭ almenaŭ de unu el la arbitraciantoj estu rezervita al la infano.

Tio signifas ke, se la patrino en individuista medio garantias al sia idaro (ŝi respondecas pri ĝia naskiĝo, ĉar la patrineco estas de ni konsiderata kiel "funkcio

aŭ produkto libervola") la zorgojn necesajn al ĝia kreskado, ĝis ĝi estos kapabla kontrakti - ŝi ne povas post la varta periodo reteni apud si kontraŭ ĝia volo sian idaron.

La nocio de deviga familio pro "la sangoligoj" estas al ni fremda. Estas individue, for de ĉia ideo pri kunvivado, ke la posedo de la persona produktrimedo estas garantiata al la infano, al la virino, al la viro.

***

En la ideologia kondutregulo, kiu aperas en ĉiu kajero de "La Eksterulo"*, fakte temas pri via abomeno kontraŭ la trudita socikontrakto. Ĉu vi povus indiki al mi sur kiuj bazoj sin apogas tiu abomeno ?

Ni konstatas, ke jam de sia naskiĝo, dum ĝi posedas nek volon por konsenti, nek racion por sin defendi, nek potencon por kontraŭstari, la homa unuo estas subigita al la aŭtoritata fakto : aŭtoritato de la naturo, aŭtoritato de la trudita socikontrakto.

Ni konstatas, ke jam de la unuaj paŝoj kaj subite la homa unuo estas integrita en, aŭ igita partoprenanto en aferstato aŭ kontrakto (etika, ekonomia, intelekta, ktp...) fiksita kaj establita - kaj ke la edukado al li donita celas instigi lin obei al tiu kontrakto aŭ al ĉia alia unuflanka kaj anstataŭa.

Ni fine konstatas ke, atinginte la raciaĝon, la homa unuo troviĝas devigata konformiĝi al la dirita aferstato (aŭ al ĉia alia ĉi tiun sekvanta) sen ia ebleco ĝin malobei, aŭ rifuzi plenumi ĝiajn klaŭzojn pretekste, ke parte aŭ tute tiu kontrakto estas la faro de la publika

---

* "L'En-Dehors", ĉiumonata gazeto iniciatita de E. Armand, aperis ĝis la dua mondmilito. Poste ĝi estis anstataŭita de "L'Unique" (la Unikulo), kiu en la 1950aj jaroj pro la granda aĝo de Armand reduktiĝis al artikoloj en la kolumnoj de "Défense de l'Homme" (Defendo de l'homo). E. Armand tie artikolis preskaŭ ĝis sia morto, kiel 93-jarulo. (N.d.l.trad.)

opinio aù de la kutimo - aù la rezulto de la volo aù decido de unu sola, de elito, de minoritato posedanta la povon, de majoritato posedanta la potencon sin trudi, reprezentata de siaj komisiitoj, ktp, ktp.

La socia kontrakto (etika, ekonomia, intelekta aù alia) altrudita, deviga por ĉiuj kaj kiu ajn, eĉ por tiu, kiu rifuzas konformiĝi al ĝiaj klaùzoj tial, ke ĉi tiuj al li ne konvenas - la kontrakto kontraùvola, nenuligebla : jen tio, kion ni nomas la aùtoritata fakto, la stato de arkio.

La ebleco por homaj unuoj posedantaj volon, racion, potencon tion fari, cele al kiu ajn fino kaj por kiu ajn projekto libervole starigi kontrakton - kontrakton nuligeblan post antaùsciigo, modifeblan, renovigeblan laù la plaĉo de la kunkontraktintoj - sen ebla entrudiĝo sub kiu ajn formo de aùtoritato registara, centraliza aù administra : jen tio, kion ni nomas la libereco, la stato de an-arkio.

La fakto, ke la homa unuo ricevis la vivon, dum ĝi posedis nek volon por tion konsenti, nek racion por sin defendi, nek potencon por kontraùstari, laù ni pravigas, ke ĝi kiel kompenson uzas la spertakirojn de la antaùaj generacioj.

Por ke la homa unuo povu posedi la potencon libervole kontrakti - nome proponi, diskuti, akcepti aù forpuŝi la kontraktajn terminojn - esence estas, ke ĝia rifuzo aù opono ne rezultigu la nekontentigon de ĝiaj bezonoj aù apetitoj, kio okazas, kiam la produktrimedo (grundo, ilo, ajna aparato aù ties reprezenta titolo) apartenas al privatuloj, al la Ŝtato, al la Kolektivo, al la Komunumo aù alia formo de socia aù universala Ensemblo. Tiu stato de malsupereco same renkontiĝas, kiam la homa unuo fraùdiĝas je la libera dispono pri sia individua produkto.

Laù ni la potenco kontrakti kuŝas en la persona posedo kun karaktero nenuligebla de la produktrimedo kaj la libera dispono pri la persona produkto. Aù pri ilia reprezenta titolo.

Per persona ni signas, kion oni povas valorigi nure

per si mem sen eksplųatado aŭ superregado super aliulo.

Nur per la nenuligebla posedo de la persona produktrimedo la homa unuo povas ricevi sian integran laborprodukton, izoliĝi aŭ asociiĝi, laŭplaĉe disponi pri sia produktaĵo kaj favore al kiu ĝi elektas, cirkuli laŭ sia bontrovo, solidariĝi kun kiu ĝi volas, desolidariĝi de kiu al ĝi ne konvenas, ktp.

Ni konsideras, ke justa kompenso estas por la homa unuo, trovi ĉe sia naskiĝo la garantion, ke ĝi povos, izolita aŭ asociita, trakti per komuna akordiĝo kaj kun egala libereco kun ĉia individuo aŭ medio kun kiu ĝi povos rilati.

La estaĵo (individua) sen la havaĵo (individua) estas sensencaĵo.

La persona posedo de la produktrimedo (ekonomia, etika, intelekta, distra aŭ alia) aŭ de ties reprezenta titolo (transdonebla) nature implicas ke en ĉia laŭ nia maniero individuista medio, ĉiu ricevas aŭ rikoltas laŭ sia peno, sia faro, siaj agoj ; estu ja komprenite, ke al ĉiu homa unuo estas donita la ebleco pleje valorigi sian produktrimedon. La individuistoj laŭ nia maniero kontraŭbatalas same la devigan parazitismon kiel la truditan solidarecon, tio estas : rilate kion ajn, ne konsumas kiu ne produktas. Male ili konsideras juste, ke ĉiu ricevu laŭ siaj bezonoj aŭ apetitoj (nutraj, intelektaj, etikaj, seksaj, distraj, ktp) de tiam, kiam li plenumis la agon, la faron, la penon priskribitan de la asocia kontrakto.

Se, por la individuistoj laŭ nia maniero, nur la produkto povas esti objekto de interŝanĝo, donaco, testamentaĵo, ktp - post la morto de ĝia izolita aŭ asociita posedanto la produktrimedo aŭ ties reprezenta titolo fariĝas publika posedaĵo laŭ difinotaj aranĝoj inter izolitoj kaj asocioj. Sufiĉas, rilate la produktrimedon, ke staru ĉe la deirpunkto justeco en la posedo. Ni eĉ allasas la eblecon de restarigo de tiu justeco dumvoje. Ni konsideras kontraŭa al la persona disvolviĝo la fakton eviti al la homa unuo "fari siajn eksperimentojn".

Se ni konsideras juste garantii kontraŭ ĉia translimiĝo la izoliton, kiu volas vivi aparte de ĉia asocio eta, meza aŭ granda, tuj kiam li estas kapabla kontrakti aŭ post eksperimento, tiu izolito povas riproĉi nur al si mem, se li ne ĝuas la avantaĝojn de la asociado. Li povas pri nenio al iu reklamacii.

Same la asociito scias, ke li memvole rezignas la profitojn, kiujn povas havigi al li la izoliteco.

Laŭ la principo de kompenso ne estas juste ke la infano, la patrino kiu vartas sian idaron, la lacigito, la malsanulo, la portempa netaŭgulo, la maljunulo, ktp, ne povu trovi kontentigon de siaj bezonoj aŭ apetitoj tial, ke akcidente ili estas nekapablaj por peno, faro aŭ ago. Unu el la klaŭzoj de la asocikontrakto inter individuistoj laŭ nia maniero implicas , ke laŭ difinota aranĝo (asekuro, garantiismo, ktp) tiom longe kiom daŭras la nekapableco, la asocio ilialoke valorigas la produktrimedon, kies personaj posedantoj ili estas.

Sed en la spirito de la Individuistoj laŭ nia maniero la plena realiĝo de tiuj depostuloj ne nur kompreniĝas kun la kondiĉo de reciprokeco, sed ĝi estas funkcio aŭ komplemento de la ĝenerala memsostato aŭ de la moroj implicantaj aŭ garantiantaj la senpovecon, la neeblecon por ĉia homo, medio, administracio, registaro, ajna ŝtato - kaj tion sen rezervo nek artifiko - entrudiĝi, enmiksiĝi, interveni, translimiĝi en : la vivo aŭ interrilatoj de la homaj unuoj - la celon, la ekziston, la evoluon aŭ la funkciadon de la grupoj, asocioj de individuoj, federoj de grupoj, de asocioj.

Mi aŭdas - kaj prefere mallaŭde - pri via liberseksismo, pri viaj depostuloj koncerne la seksajn liberojn, ktp, kaj pri via tezo pri la "amora kamaradeco". Ĉu vi povas rapide min informi pri tiu demando kaj ĝin klarigi ?

La graveco, kiun ni atribuas al la seksa emancipado, ankaŭ al ni rimarkigis, ke iuj konceptoj pri la libera amo kondukas al tio, ke la plej naturdotita (per inteligento, beleco, forto, ktp) estas arbitre favorata malprofite al la tiurilate malpli dotita, eĉ se li pli

reagus kontraŭ la media arkiismo. La fakto, ke la malfavorito rilate belstaturon, korpan esprimon, parolemecon, ktp, estu forpuŝita de la sentimentalaj ĝuoj, ŝajnis al ni kontraŭa al la kamaradeco - ne nur al la kamaradeco sed ankaŭ al la justeco ; ankaŭ ŝi, ankaŭ li, naskiĝante, posedis "nek volon por tion konsenti, nek racion por sin defendi, nek potencon por kontraŭstari". Kial la kompensprincipo ne ludus favore al ŝi, al li ? Tial, ni rigardas la amajn rilatojn inter individuistoj kiel aferon de simpla kamaradeco.

Ŝajnis al ni, ke propagando rezonita kaj daŭra kontraŭ la familispirito kaj kunvivado, (statikaj formoj de socia konservatismo nete anti-individuistaj) favora al voluptaj eksperimentoj konsiderataj kiel arto aŭ produkto, en kiu la persona serĉado de l'plezuro antaŭas la aspekton de kiu ĝin havigas, ktp - estas tia, ke ĝi povas ĉiam pli redukti la privilegiojn kaj la monopolojn"en libera amo".

Ni forĵetas la "geedzecon kolektivan" aŭ "komunuman", kaj kontraŭmetas al ĝi la tezon de la libervola asocio kun celoj pure seksaj (ĉu temas pri rilatoj heteroseksaj, samseksaj, duseksaj aŭ miksaj unuiĝoj). Oni scias, kiel nia persona tezo pri asociismo solvas la problemon : en selektita medio kunigita laŭ afinecoj : afinecoj pri ideoj, pri aspiroj kaj personaj praktikoj, plenumita la peno, la faro, la ago postulita de la kontrakto, tiu ĉi inkludas la amorajn manifestadojn kiel unu el la konsumproduktoj ofertitaj pro "reciprokeco" aŭ "kontentigo de la bezonoj". Neniom da ĵaluzeco, rifuzo, ekskluziva prefero.

La geedzeco "kolektiva", "komunuma" aŭ "grupa" prezentas karakteron devigan. Nia persona tezo estas, ke la amora kamaradeco igas tiujn pli bonaj kamaradoj, pli perfektaj, kiuj ĝin praktikas laŭ ĝia spirito kaj ĝia formo.

Estas komprenite, ke tiu, kiu volas resti izolita koncerne la amajn rilatojn, kontentiĝi per unikeco, rezignas pro sia elekto la variecon, diversecon, multecon, avantaĝojn kiujn, koncerne amaferojn, la asocio povas havigi al siaj kamaradoj de unu al alia sekso.

Malgraù la ripetoj entenataj en via listo, malgraù la kontraùdiroj kiujn povas estigi pluraj el viaj tezoj, kvankam iuj el viaj depostuloj bezonus kompletigon, interpreton kaj precipe praktikan provon, mi malkonfesas, ke ili konsistigas la karakterizan tendencon de via individuismo - tamen rimarkigante al vi, ke vi ne estas la solaj, kiuj formulas plurajn el inter ili. Mi nun demandos vin je kiuj signoj, je kiuj agoj, je kiuj opinimanifestadoj oni povas rekoni la Individuiston tia, kia vi ĝin komprenas ?

Por sincere paroli, ni opinias, ke oni estas individuisto multe pli pro la temperamento ol pro tio, ke oni estas aliĝinta al la Individuismo konsiderata kiel doktrino, aù konsentinta al la ĉi-supraj Depostul-tabelo aù tezoj, aù al analoga listo. Oni estas individuisto, ĉar tio estas en onia "naturo". Oni tiel estas, ankaù tial, ke la pripensoj, la studado, la spertoj de la persona vivo permesis al tendencoj latentaj aù nekonataj liberiĝi, certiĝi laù maniero favora al la individuismo.

Se tio ĉi komprenita, ni rigardas Individuisto - unu el la niaj - iun ajn - viron aù virinon - en situacio sin determini mem, kiu sin konsideras aùtonoma unuo, netuŝebla, raportanta nur al si mem pri siaj diroj kaj faroj, pri siaj penoj kaj agoj, sen rekoni aliajn limojn al sia ekspansio, al sia persona disvolviĝo, ol alies aùtonomecon.

Ni rigardas Individuisto - unu el la niaj - iun ajn - viron aù virinon - en situacio sin determini mem, kiu :

- Persone ne pli volas esti superregata, mastrata aù ekspluatata de aliuloj, ol superregi, mastri aù ekspluati aliulojn ;
- Situiĝas en stato de necesa sindefendo kontraù ĉio - konceptoj pri la homa ekzisto, institucioj, ties plenumantoj aù aliaj - kiu celas, instruas, realigas la submetiĝon de la individuo al la socio, la subpremadon de unu fare de la grego ;
- Intencas gvidi la antaùiradon de sia evoluo, havi sian apartan difinon de uzo kaj trouzo laù sia memkono,

ekzercado de sia sentemeco, sia pripensa kapablo, sia persona povo rezisti al la mediaj influoj, sia propra vivkoncepto - de ĉio ĉi rezultigas, dependigas la elekton de siaj eksperimentoj, sian serĉadon pri la utilaĵo kaj la agrablaĵo, kaj sian batalon kontraŭ la translimiĝoj de la "ekster-mio" ;

- Volas bazi nur sur la reciprokeco la rilatojn kun siaj samspecianoj ;

- Kies ekzistovolo, vivoamo kaj vivoĝuo konceptiĝas ekstere de ĉia alies interveno - regularoj, leĝoj, konvencioj, moraloj, tradicioj, aŭ ĉia alia agado trudodeviga aŭ ne.

Mi tute ne pretendas, ke tiu pritraktado ne povus kolizii kun pridetalaj diverĝoj laŭ la personecoj al kiuj oni sin turnus - sed la Individuistoj, kiuj ni estas, akordiĝas, mi kredas povi ĝin aserti, pri la ĝenerala tendenco ĉi-supre priskribita.

Ĝis nun vi elmetis al mi ĝeneralan tendencon, spiritostaton, aŭ se vi preferas specialan mensostaton. Ĉio ĉi estas iom nepreciza kaj vortabunda. Sed sen esti iu Partio, ĉu via Individuismo ne posedas Programon de agado, de realigoj - tuŝeblaj - almenaŭ minimuman programon ? Alidirite, kiun objekton celas via propagando, kiujn praktikajn aplikojn ĝi povas montri ?

Ĉar ni intencas trudi nek nin mem nek niajn ideojn, - ĉar ni forpuŝas uzon de la organizita perforto aŭ de la trudpremo por atingi la realigon de kiu ajn el niaj depostuloj, evidentas, ke nia propagando konsistos preskaŭ nur en edukado kaj ekzemplo.

Nia propagando konsistos en serioza, rigora, dokumentita, profundigita kritiko de la institucioj kaj de la superregaj kaj ekspluataj reĝimoj esploritaj, dispartigitaj sub la lumo de nia vivkoncepto, - en la diskonigo de la ideo, la semado de la konvinko, ke estas ĉiurilate preferinde anstataŭigi la socian aŭ administran trudpremon per la ebleco por ĉiu disvolviĝi laŭ sia aparta determinismo, kaj kuniĝi kun aliaj laŭ per-

sonaj afinecoj, - en la demonstrado pri la absurdeco subigi ĉiujn temperamentojn, ĉiujn individuajn dispoziciojn al unuflanka instruado, al unuforma reglamento. Evidentas, ke inter tiom da aliaj maljustaĵoj, absurdaĵoj aŭ antaŭjuĝoj, nia propagando insistos pri la moroj, kiuj permesas al la plimultoj subpremi la malplimultojn, al la amasoj sufoki la izolitajn iniciatojn aŭ individuojn, al la Ŝtato aŭ Administracio rekvizicii homan estaĵon por ĝin trudpeli al partopreno en tasko aŭ al plenumo de devigo, kiun ĝi abomenas. Nia propagando penos kontraŭbatali la kutimon juĝi la valoron de individuoj, konsiderataj aparte, laŭ la monopoloj aŭ privilegioj, kiujn ili akaparis aŭ heredis ; ĝi proponos alian normon por persona taksado : normon, kiu relativigas la individuan valoron al la klereco, al la originaleco de la individuo, al ties kapablo rezisti al la eksteraj influoj, al ties potenco utiligi siajn pasiojn.

Nia propagando plie penos demonstri ke, tiom longe kiam la produktrimedoj, la kapitalo, la povo emisii ŝanĝovalorojn, la konkurenco estos rezervitaj al minoritato de privilegiuloj, al administracio, al ajna aro socia aŭ al la ŝtato, restos al la aliaj homoj nur la libero ekzisti kiel sklavoj, salajruloj aŭ funkciuloj.

Nia propagando fine zorgos pri memrivelado de individuistaj temperamentoj, kiuj ne sin konas mem, kaj de individuistaj mensostatoj, kiuj pro ia kialo ankoraŭ ne havis la okazon sin manifesti.

Kaj la perekzempla propagando dependos de la temperamento de la propagandisto. Ĝi povos konsisti en la individua praktikado de iuj depostuloj aŭ tezoj, kies tabelon mi skizis, en la formado de asocioj celantaj eksperimenti plurajn el ili. Ĝi povos ankaŭ resumiĝi en persona sinteno de rezisto kaj opono kontraŭ la translimiĝoj de la "ekstermio", je la respondeco de la individuisto(j), kiu(j) ĝin adoptis, aŭ kun ĝi solidariĝis.

Senutilas diri, ke ĉiu el la niaj, izolita aŭ asociita, sin dediĉas al la speciala propagando, por kiu lin dispozicias lia aparta determinismo aŭ tiu de la libervola asocio, kies ano li estas.

Ni ne rigardas la konvertadon de la tuta homaro al la

anarkiista vivkoncepto kiel la ekzistopravon aŭ la konsekvencon de nia vivo en <u>an-arkio</u> (senhelpe de la leĝo aŭ registaro). Sen atendi, ni plupenas pleje kontentigi niajn bezonojn kaj apetitojn, realigi niajn dezirojn - lasante al la venonta generacio de kamaradoj la zorgon pri pli plena realigo, se ĝi povos - kaj tiel plu ĝis kiam la homaro sorbigita, saturita, ronĝita, korodita, impregnita de individuismo - senleĝigita, senmoraligita, sensociigita - rezignos la arkiismon, la doktrinan universalecon, la unikan solvon, la identan realiĝon, la unuflankan kaj truditan kontrakton, finfine !

Cetere ni opinias, ke la malapero de la grandaj homaj aglomeroj, de la egaj centroj de industriproduktado, la reveno al la kamplaboro kaj al la metiaro ambaŭ favoraj al la asociado ; la ĝishejma disdono de mova forto facile havebla kaj kaptebla - la ebleco de konstantaj translokiĝoj dank'al individuaj transportrimedoj simple direkteblaj - estas kondiĉoj preskaŭ nemalhaveblaj por la malapero de la aŭtoritata stato, de la arkio.

Iuj kamaradoj opinias, ke larĝa malpliiĝo de la terglobe loĝantaro, ties redukto al la dekono, dudekono, eble kvindekono de tio, kio ĝi estas nun - la relativa forlaso de regionoj kie ne plu kreskas la olivarbo aŭ la vito - estas cirkonstancoj favoraj al la estiĝo de individuistaj medioj.

La ĉefa demando por la individuistoj laŭ nia maniero kuŝas malpli en la superabundo de la produktaro ol en la ebleco de dioniza vivo, vivo sen dioj kaj mastroj, vivo el sendependeco kaj aventuroj, el malkovroj kaj eksperimentoj en ĉiuj sferoj de la homa aktiveco, sen bariloj aŭ rezervoj spiritaj, moralaj aŭ aliaj.

La "individuista civilizacio an-arkiista" stariĝas sur la diseriĝaj ruinoj de la "arkiista civilizacio". Ĝi ne pluigas ĝin. Ĝi havas nenion por fari kun ĝi.

* * *

Se mi bone komprenis, en tiu tabelo el depostuloj, nure temas pri la depostulo pri tio, kion la burĝoj nomas "rajtoj". Meze de viaj asocioj ĉu vi ne preskribas "devojn" ?

La individuistoj laŭ nia maniero konas nek rajtojn nek devojn. Iliaj interrilatoj estas bazitaj sur sento nomita "kamaradeco", speco de libervola asekuro, kiun interkonsentas la individuistoj por domaĝi inter si la senutilan kaj eviteblan suferon.

Niaj individuistaj asocioj estas medioj, kies elementoj kune decidis havigi al si la plej grandan sumon da ĝojoj kaj ĝuoj akordigeblaj kun la anarkiista nocio pri la vivo. La tendenco estas ke en ilia sino realiĝu la kontentigo de ĉiuj bezonoj, ĉiuj deziroj, ĉiuj aspiroj sperteblaj, senteblaj, koncepteblaj de estaĵoj, kiuj neas la diojn kaj la mastrojn en ĉiuj sferoj.

La "konkurenco" mem tia, kia ni ĝin komprenas, estas aspekto de tiu kamaradeco, kiu deziras helpi ĉiun el ni manifestiĝi, riveliĝi, prezentiĝi sur ĉiuj kampoj laŭ siaj kapabloj aŭ laŭ la instigoj de siaj deziroj.

Laŭ nia koncepto, jam elmetita, la individuistoj tra la mondo konsistigas "specion", formas medion cementitan per ligilo praktika, nevortigita kaj ne diskutata : la kamaradeco, kies modalecon mi ĵus klarigis. En la plej malbona okazo la praktiko de la kamaradeco subkomprenas, ke inter ni - kaj kiu ajn estas la an-arkiista tendenco al kiu oni aliĝas - oni ne malutilu, ne maljustu unu al la alia, oni ne intervenu en la eksperimentoj al kiuj oni estas individue aŭ plurale instigata de sia determinismo.

Rilate la arkiistojn, la aprobantojn de la trudita socikontrakto, la inter ili intensa propagando de ni farita, liberigas nin de ĉia posta respondeco.

Mi revenas al via listo de depostuloj : vi tie montriĝas kontraŭa al la ŝtato, kio estas tre komprenebla, se konsideri vian mensostaton. Sed vi nenion diras pri la parlamentismo. Ĉu vi ĝin ampleksigas en la sama malaprobo kiel la ŝtaton ?

La Individuistoj laŭ nia maniero konsideras la ŝtaton kiel la negacion mem de la individua fakto. Estus bagatele persisti tion demonstri. En ĉiuj tempoj la agado de la ŝtato konsistis en tio ĉi : subordigi je sia ekzisto, utiligi je sia profito la individuajn kapablojn, forigi aŭ almenaŭ igi sendanĝeraj la manifestadojn minacantajn atenci al ĝia potenco. La ŝtato rigardas la socian unuon - la civitanon, la regaton, la protektaton - kiel materion servutodevan, laŭvole imposteblan, rekvizicieblan en tio, kion ĝi havas kaj kio ĝi estas, al kiu estas malpermesite rezisti aŭ eskapi - eĉ protesti - sen risko de punoj gradiĝantaj de monpuno ĝis la morto. La ŝtato opinias ke, kiam ĝia konservo estas riskata, nenia konsidero povas superiĝi - ĝi tiam por pluekzisti, por plu daŭri estas preta malobservi aŭ falsi la plej elementajn regulojn de tiu moraleco, de tiu leĝeco, de tiu kolektiva aŭ persona sekureco, kies perfektan gardiston - ĝi tiel pravigas sian ekziston - ĝi devas roli. Se necesas - sen alia motivo ol la ŝtata intereso - ĝi disigos ĉian asocion, enkarcerigos aŭ deportos ĉian individuon, kies aktivecon aŭ influon ĝi timas, ĝi malhelpos ĉian kontraŭan opiniesprimon.

Tre atente analizinte la agadon de l'parlamentismo, oni trovas : aŭ ĝi leĝe sankciis agadmanierojn jam enmorigitajn ; ĝi tiam estas senutila - aŭ ĝi obstaklis al kolektivaj aŭ individuaj depostuloj - cele al ĉiamigo de la politika kaj ekonomia superrego de dinastioj el grandaj tenantoj aŭ akaparantoj de monkapitalo kaj produktrimedoj, el grandaj bienposedantoj, el altrangaj funkciuloj kaj administrantoj de la socia organizo, el ĉiuspecaj monopolistoj ; ĝi tiam estas malutila.

Jam de sia stariĝo la parlamenta sistemo ne nur montriĝis la plej fidela helpanto de la ŝtato, sankciante ties plej aĉajn atencojn kontraŭ la libereco de la individuoj, asocioj, manifestadoj de la homa penso - sed plie ĝi tenas, eĉ se ĝi lojale funkcias, la subpremadon super la personoj, la ne-elektantoj aŭ super la balotaj malplimultoj fare de la rajtigitoj aŭ de la balotrajtaj plimultoj. Nome la triumfon sub ĉiuj reĝimoj kaj en ĉiuj kampoj de la politika koncepto konservativa, mezpartia

- de la trivialeca mensostato, kiu rezultas de la ĝenerala opinio kreita, inspirita, plutenata pere de deviga instruo, "popularaj" penso kaj literaturo subvenciitaj ĉu de la registaro ĉu de la privilegiuloj, kies interesojn ili pli-malpli hipokrite reprezentas kaj defendas.

Ĉar vi ignoras la Ŝtaton, la parlamentismon, ĉian registaron, ĉu vi povas klarigi al mi, kiel vi konceptas la funkciadon de individuista socio ? Pri ĝi vi neniel aludas en via listo de depostuloj.

Fakte tiu tabelo de la depostuloj ne celas, en mia spirito, indiki je kiuj kondiĉoj "Individuista Socio" povus ekzisti, sed en kiuj kondiĉoj la individuistoj izolitaj aŭ asociitaj povus senmalhelpe evolui, senĝene disvolviĝi, fine "travivi sian vivon". Cetere ĉar - laŭ ni - la Individuisto estas temperamento, ne povas ekzisti "Individuista Socio", aŭ pliverdire estas tiom da Individuistaj Socioj kiom da individuistaj temperamentoj.

Se la individua fakto okupus la unuan planon, el tio rezultus la multeco de la asocioj grandaj aŭ malgrandaj, senĉese renoviĝantaj per la foriro kaj eniro de unuoj eksperimentavidaj - familiaj interkonsentoj kun malmultaj membroj - ebloj de izolitaj ekzistoj - sekve : universala tendenco al la diferencigo, al la malcentralizado, al la partikularigo. De tiu aferstato rezultus por la homo kun individuista dispozicio multaj okazoj manifestiĝi, perfektiĝi, disflori - multaj okazoj, kiujn ĝi malhavas, kiam la fakto socia regas, superregas, kondukas la homajn klopodojn kaj ties aplikadon. La vera intereso de la Individuisto ne kuŝas en la starigo aŭ instalado de individuista socio (ĉu povas ekzisti "socio" sen registaro, sen administra aŭtoritato ?), sed en la plifortigo de la pozicio okupata aŭ celata de la "individua fakto".

Ni nepre memorigu ĉi tie, ke ĉiufoje kiam la individua estaĵo sukcesas, koncerne apartan punkton, malimplikiĝi el la tentakloj de la socia polpo, inspiri al la medio respekton al sia personeco, atingi traktadon per laŭvola interkonsento inter egaluloj, ĝi parte realigas la Individuistan Socion. Oni povas diri, ke same estas, kiam unu

el la depostuloj de la ĉi-supra tabelo enmorigas, kaj enplantiĝas en la homan mensostaton - la "Individuista Socio" paŝas al la realiĝo. La Individuista Socio "faras sin", "fariĝas" laŭmezure kiel la homa etoso saturiĝas de anarkiista individuismo - ĝi estas funkcio de la situacio akirita de la individua fakto.

Necesas kompreni, ke la libereco estas koncepto, fenomeno kun negativa karaktero - ne pozitiva. Oni estas libera, oni fariĝas libera laŭmezure kiel oni sukcesas malpliigi la ĉiuspecajn trudpremojn, kiuj forte surpezas la personan determinismon.

El ĉio antaŭa ĉu mi konkludu, ke vi plene akceptas la kunekzistadon de asocioj - libervolaj, senutilas ĝin diri - bazitaj sur ekonomiaj konceptoj absolute malsamaj ? Mi supozas, ke en la socio, kie la individuistoj laŭ via maniero "senĝene evoluus", oni renkontus asociojn mutualajn, kooperativajn, kolektivistajn, komunistajn, ktp, aŭ interne organizitajn laŭ tre malsamaj metodoj.

Efektive la ebleco de tiu kunekzistado - de tiu konkurenco - ja eniras en la kadron de niaj aspiroj. Ĝin formuli estas demonstri - ni tion diru preterpasante - la vanecon de la koncepto pri "Individuista Socio". Tiu kunekzistado estas necesa tial, ke ĝi sola permesus al la individuisto "pro eraro" - al kiu ajn ne trovis la esperitan kontentigon en la izolado, la malmultmembraj interkonsentoj, la individuistaj asocioj - eksperimenti aliajn formojn de asociado. Nu, nur "a posteriori" oni povas determini aŭ ekkonscii ĉu oni estas aŭ ne Individuisto.

Individuistoj - izolitaj aŭ asociitaj - ni neniam pensis postuli de la ne-individuistaj asocioj ion alian ol la garantion de nia aŭtonomeco kaj la certecon de ilia ne-interveno en niajn realigojn de individuista vivo. Tiuj asocioj lasu nin agi, varbi, laŭ nia plaĉo eksperimenti, ne malhelpu la propagandon pri niaj depostuloj, aspiroj, rezultoj de niaj eksperimentoj kaj ties konsekvencoj ; ni postulas neniom pli.

Oni povas antaŭvidi cirkonstancaron ebligantan grandan disvolviĝon de la asocioj ; tiam homa estaĵo povus samtempe partopreni en diversaj grupoj, kies funkciado plene diferencus laŭ la trafenda celo. Krome, pro nuancigo de la personaj temperamentoj - kiun nia Individuismo emas pliampleksigi - ankaŭ la asocioj kun individuista karaktero diferencus inter si ; sekvus plivastiĝo de la eksperimentkampo proponita al la Individuistoj, kies dispozicioj puŝas al asociado prefere al izolado aŭ al interkonsentoj malmultmembraj.

Ĉu vi volas klarigi al mi, kion - laŭ via speciala vidpunkto individuista - vi komprenas sub "ekspluatado", ties malapero aŭ abolicio kiu konsistigas unu el viaj plej gravaj depostuloj ?

Ni komprenas sub "ekspluatado" la sistemon, dank'al kiu ĉia labordonanto aŭ akaparanto de la produktrimedoj povas - en plena sekureco - elpreni netan profiton el la produktado de la salajrulo, kies laboron li luas.

Ni pensas, ke la malapero de la ekspluatsistemo dependas de la ebleco - por la produktanto izolita aŭ asociita - nenuligeble kaj definitive posedi la produktrimedon. Kiam ne plu troviĝas unu sola produktanto senigita je la produktrimedo, tiam nek ekspluatado nek ekspluatanto havas pluekzisto-pravon.

Ni opinias, ke ekzistas ankaŭ ekspluatado de la individua estaĵo, kiam ĝi estas devigata de iu Ŝtato, iu Socio, iu Administracio aŭ iu ajn el siaj samuloj kontribui aŭ partopreni en liveradoj, impostoj, taksoj, elspezoj iaspecaj destinitaj al la tenado de institucioj, al la funkciado de servoj aŭ al la salajro de funkciuloj, kiujn ĝi ne bezonas, kiujn ĝi neniel uzas, kies utilecon ĝi ne agnoskas.

Ni opinias ankaŭ, ke ekzistas ekspluatado, kiam produktanto estas iel ajn devigata kompletigi - per forpreno de parto de sia persona laboro - la produktokvoton aŭ la vivtenadon de aliulo, kies produktado neegalas aŭ malsuperas la lian.

Kompreneble ne povas temi pri ekspluatado, kiam la individuo libervole konsentas pagi la laboron de unu aŭ pluraj el siaj samuloj, kies profesio aŭ aktiveco estas al ĝi utila aŭ agrabla - ekzemple pagon al transportisto, kolportisto, instruisto, kuracisto, artisto aŭ entrepreno plenumanta ajnan servon. Same ne povas esti ekspluatado en okazo de libervola kotizo destinita por permesi al neadaptito, malsanulo aŭ kriplulo ricevi apartan aŭ daŭran flegadon, al maljunulo pace travivi siajn lastajn jarojn ĉirkaŭita per amo kaj prizorgemo, al scienculo plenumi iujn sciencajn esplorojn, al muzikisto perfektiĝi en sia arto, al animanto aŭ administrantoj de periodaĵo daŭrigi aŭ etendi ties publikigon, al sanatorio stariĝi aŭ pligrandiĝi, al ajna asocio klopodi por sia trafota celo, ktp, ktp.

Vi plurfoje insistis pri la "konkurenco". Ĉu la individuistoj laŭ via maniero estus partizanoj de la milito, kiu ŝajnas al mi grandskala aplikado de la konkurenco ?

Ni efektive estas partizanoj de la konkurenco, alidirite de la ebleco por ĉia konsumanto kompari diversajn produktojn, inter ili elekti, stimuli la produktanton per la postulo de produkto pli perfekta - de la ebleco por la produktanto oferti produkton pli originalan, pli rafinitan, pli bone prezentitan ol la produktoj proponitaj sur la merkato en la sama epoko. Ni opinias, ke abolicio de la konkurenco inter produktantoj aŭ asocioj kondukus al ĉesigo de la perfektiĝo kaj de la serĉado en ĉiuj branĉoj de la homa aktiveco. Forigi la konkurencon estas devigi konsumanton kontentiĝi per malsupera aŭ senkaraktera produkto. - La malapero de la konkurenco realigita de la ega manufaktura koncentrado, la laŭseria fabrikado kaj la defalo de la metiaro, ekzemple, nekontesteble rezultigas ĝeneralan malleviĝon de la gusto, ĝeneralan retroiron de la kreiva originaleco.

Sed ĝuste tial, ke ni ne rezignas la konkurenceblon inter produktantoj aŭ asocioj, ni estas la neredukteblaj kontraŭuloj de la milito - nome de la batalo por la superregado inter ŝtatoj, politikaj sistemoj, registoj, monopolistaj aŭ privilegiaj societoj, kies interesoj kaj

aspiroj havas nenion komunan kun la evoluo aŭ disvolviĝo de la individua estaĵo. En ĉiuj landoj la proklamado de la militstato reduktas al rolo de vivanta aŭtomato la Individuon, kies persono kaj havaĵo ankoraŭ pli ol en pacostato estas je la dispono de la Registaro aŭ de la Militaŭtoritato sen ia protesteblo, kiom ajn forte leviĝus en li la vivovolo, la memkonservinstinkto. Kiel oni vidas, tio estas la malo de la "konkurenco".

Se la Individuisto depostulus la ekziston de vivarangô, en kiu estus neeble trudi aŭ dikti iun solidaragon aŭ iun kontrakton nacian, socian aŭ ian ajn, tio sufiĉus indiki, ke la milito - kolektiva aŭ individua interbuĉado leĝe reglamentita kaj organizita, kiu plej grave atencas al la persona aŭtonomeco - neniaokaze povus teni lian simpation.

Mi plurfoje troviĝis en ĉeesto de anarki-komunistoj aŭ de komunist-liberecanoj. Samkiel vi, ili kontraŭbatalas la Aŭtoritaton, la Ekspluatadon, la Ŝtaton, la truddevigajn Instituciojn - samkiel vi, ili denuncas la malbonfarojn de la Registaro aŭ de la Parlamentismo. Laŭ via parolo ŝajnas, ke vi akordiĝas kun ili pri multaj punktoj. Fakte, en kio vi diferencas?

Ni, antiaŭtoritataj anarkiistoj (aŭ an-arkiistoj individuistoj) efektive havas multajn komunajn punktojn kun la anarki-komunistoj aŭ komunist-liberecanoj. Ni unue pensas, ke ekzistas kondutado, spiritinklino komunista, samkiel estas temperamento, pensmaniero individuista. Due, evidentas, ke loko ne mankas sur la planedo - kaj ne povus manki - por la propagando kaj eksperimentado pri la aspiroj de ĉiu el ambaŭ tendencoj.

Konvenas aldoni, ke inter la komunistoj troviĝas multaj kamaradoj, por kiuj ni nutras grandan estimon, kies strebadon ni alte taksas, kaj ni inklinas kunlabori kun ili en la kritiko de la institucioj kaj antaŭjuĝoj, kiuj bremsas niajn respektivajn evoluadojn.

Kio disigas nin de la komunistoj, estas ilia koncepto pri socio ekskluzive organizita - laŭ ekonomia vidpunkto - sur komunista bazo.

Pro tio ke la produktrimedo apartenas al la socia Ensemblo - ke la socio povas produkti kaj konsumi, interŝanĝi siajn produktojn aŭ ricevi ajnajn utilaĵojn nur pere de la administracio de la dirita Ensemblo - timinde estas, ke la socia unuo (viro aŭ virino) troviĝus en stato de malsupereco, dependeco, zorganteco rilate la socian tuton, ia ajn estu ĝia persona kapablo, ĝiaj laboro, talento, originaleco, klereco.

Sed oni povas konsideri kiel proksimajn al ni la komunist-anarkiistojn nesocianojn - nome la komunistojn, kiuj ne rigardas la liberecan komunismon kiel doktrinon pri universala feliĉo aŭ pri tutmonda organizo, sed kiel koncepton pri portempaj asocioj, por kiuj lastaj ili depostulas la plenan eblecon ekzisti, realiĝi, disvolviĝi kaj funkcii laŭ la komunistaj aspiroj ; kun nenia kaŝita penso ĝeni la evoluon de la nekomunistaj asocioj aŭ sin konsideri "superaj".

Mi aŭdis pri la simpatio manifestita de la Individuistoj laŭ via maniero al la "eksterleĝuloj", al la kontraŭleĝuloj. Kio vera estas en tiu aserto ?

Ĉar ni estas lokitaj en Socio kie la socikontrakto kaj la ekonomiaj kondiĉoj estas regulitaj, establitaj kaj truditaj tiamaniere, ke estas neeble por iu ajn sociano diskuti tiun kontrakton aŭ ĝin eviti, klare estas, ke ni ne povas adopti la sentojn de malamo kaj antipatio, kiuj animas la privilegiulojn kaj profitantojn de la dirita socikontrakto, rilate tiujn, kiuj ne etikete ĝin rompas. Kiam klarigita tio ĉi, ni kredas, ke la "neregularismo" - kies iu formo estas la "kontraŭleĝismo" - kaj la nekonformismo koncerne la ekonomiajn devigojn, dependas de karaktero, de spiritinklino kaj neniel estas doktrina punkto. Ni havas kamaradojn inter la ĉiuspecaj senregululoj - inter la ekonomiaj rezistantoj kiel inter la rezistantoj al la klasikaj formuloj pri arto, beletro, edukado, moroj, ktp.

Krome en Socio, kie la subprema sistemo alprenas la karakteron de punpostulo, de venĝo kiun praktikas

la subtenantoj de la sociordo super kaj kontraŭ tiuj, kiuj minacas ilian situacion - aŭ celas la sisteman mallevon de la homa digno ; estas klare ke la enfermito inspiras al ni pli da simpatio ol tiu, kiu lin senigas je la libereco aŭ lin tenas en prizono. Tiom pli, ke ofte estas inter tiuj "senregululoj" forpelitaj el la medioj bazitaj sur la subpremado de la produktantoj, - ke oni trovas kuraĝon, malestimon al la brutala aŭtoritato kaj ties reprezentantoj, persistan rezistoforton kontraŭ intensa sistemo de individuaj kunpremado kaj brutigo, kiujn oni vane serĉus inter la "regululoj" aŭ tiuj, kiuj adoptas nur la metiojn toleratajn de la ŝtato kaj de ties polico.

Ni havas la profundan konvinkon ke, en homaro en kiu la okazoj utiligi la individuajn energiojn prezentiĝus je ĉia persona ekevoluado, en kiu ili abundus laŭlonge de la vivovojo, en kiu la senregululoj trovus eblecon por multoblaj eksperimentoj kaj senĝena moviĝo, la karakteroj kaj specialaj mensostatoj sukcesus plene, ĝoje evolui sen damaĝi iun ajn.

Ne endas forgesi, ke rilate la socikontrakton tian, kia ĝi estas nuntempe konceptita kaj aplikata, trudata kaj sankciata - la Individuistoj necese estas ekstersociaj, eksterleĝaj, ekstermoralaj.

Fronte al la arkiistoj, kies socia aŭ politika situacio, privilegioj aŭ monopoloj permesas al ili uzi la perforton, la trudpremon, la arbitron - estas logike, ke la individuisto montriĝu en stato de necesa sindefendo, ke li ne rigardu kiel seriozajn la devontigojn, kiujn li devis pro neceso konsenti. Oni komprenas ke, por sin defendi, li sin helpas ofte per la ruzo, kelkfoje per la forto. Oni komprenas ke, al la deviga ĉeesto en laborejo, konstruejo, oficejo, li preferas la kunestadon kun siaj antiaŭtoritataj kamaradoj - aŭ, izolita aŭ asociita, la celadon al individuista viveksperimento. Oni komprenas, ke individuisto malemas labori sub la rekta observado de mastro aŭ de ties prokuristo, ke li sentas skrupulon por plifortigi la pozicion de la reganto, pliriĉigi la ekspluatanton, plifaciligi la subpremadon.

En medio bazita sur la unuflanka socikontrakto trudita, nenuligebla - sur la kapitalista trudpremo neevitebla - ni rifuzas priju̧gi la konduton de kamaradoj konformiĝantaj al sia determinismo. Ĉion ekzameninte, ni logike sentas nin flanke de tiuj el niaj kamaradoj, kiuj plenscie ribelas kontraŭ la klaŭzoj de la kontrakto al ili trudita. Kaj tio ĉie, en ĉiuj tempoj, sur ĉiuj kampoj.

Konsiderante ĉion ĉi-supran, kiel vi nuntempe kondutas, kiam vi troviĝas en ĉeesto de homo aŭ ajna kolektivo, kiu translimas vian aŭtonomecon, malhelpas viajn movojn, limigas vian aktivecon ?

Oni neniam trovos la Individuiston tian, kia ni lin konceptas, en la vicoj de la regantoj, subpremantoj, ekspluatantoj, limigantoj de la individua aŭ kolektiva libereco. Jen io nekontestebla. Li forestas el ĉiuj entreprenoj, kiuj komplotas la premegon de la malfavoratoj kaj la kunpremon de la mizeruloj. La Individuisto provos, antaŭ ol ekataki, ĉiujn alvokojn al la racio, strebadon al akordiĝo. Tion ĉi plenuminte, nur rezisti li povos - igi sia(j)n agresanto(j)n nekapabla(j) noci lin, liajn parencojn kaj kamaradojn. Jen la respondo al via demando. Elĉerpinte ĉiujn rimedojn por interkonsento, la Individuisto sin defendas, sin defendos kontraŭ ĉia translimiĝo minacanta lian aŭtonomecon aŭ sendependecon.

La praktiko de la "egala libereco" subkomprenas, ke la aliulo estas preta trakti vin samkiel vi traktas lin. La sindeteno de ĉia uzo de la "defensiva perforto" estas kondiĉita de la sindeteno de ĉia uzo de la "defensiva perforto" fare de la aliulo.

Kion fari kontraŭ la estaĵo persistanta - malgraŭ ĉiuj provoj de repaciĝo, ĉiuj alvokoj al ĝia nobleco aŭ proponoj pri arbitracio - sin trudi, interveni en medio, kiu unuanime ne volas aŭ volas plu nek lin nek lian intervenon ? Ĉesigi ĉiujn rilatojn kun li, aŭ lastinstance ĝin elpeli, se ĝia insisto fariĝas materiale danĝera.

Oni diros, ke tiu solvo starigas - denove - la problemon de la interhomaj rilatoj. La Individuistoj laŭ nia maniero sincere kredas, ke sekve de intensa propagando por siaj ideoj, de la diskonigo en ĉiuj lokoj de siaj

opinioj, de la realigo almenaŭ parta de siaj aspiroj - fine de sia ekzemplo - la loĝantoj de la planedo fine agnoskos, ke estas pli juste, pli utile, ankaŭ pli agrable ne uzi la perforton aŭ la tribunalojn por solvi siajn konfliktojn. Se ĉi-lastajn la interesatoj ne sukcesas senprocese likvidi, la libervola sinturno al unu aŭ pluraj arbitraciantoj elektitaj de la enkonfliktaj partioj estas la proceduro plej rapida kaj kontentiga, estu bone komprenite, ke la funkciado de la libervola arbitracio varias laŭ la cirkonstancoj aŭ la aranĝoj antaŭviditaj aŭ deciditaj de la individuoj aŭ asocioj, kiuj ĝin utiligas.

Oni diris al mi, ke vi estas disĉiploj de la filozofo Max Stirner, aŭtoro de "La Unikulo kaj ties propraĵo". Mi eĉ aŭdis kvalifiki vian individuismon kiel "Stirneran". Kio estas en tio ekzakta ?

La individuistoj laŭ nia maniero sin ligas al neniu difinita skolo, ne pli al tiu de Proudhon ol al tiu de Warren aŭ Tucker. Ne pli al la skolo Stirnera ol al la tendenco Bakunina. Iuj el ni volonte riproĉas al Proudhon, Warren, Mackay, Tucker, ktp, jen ilian puritanismon, jen ilian plenan miskomprenon pri la kontraŭleĝista ago, laŭ ili esence revolucia. Kvankam plej ofte en akordo kun Stirner, ties peza, pedanteska kaj senĉesa internigo de la individuismo, ofte ilin tedas. Aliflanke ni retroviĝas en akordo kun Bakunin koncerne la rajton de la produktantoj pri la integraleco de sia laborprodukto, kaj koncerne la libervolan kontrakton, kies klaŭzoj ligas la kontraktantojn (tezo Prudhona, cetere).

Ĉar vi forpuŝas la ideon atingi per uzo de la organizita perforto aŭ de iu ajn truda, deviga agado la kontentigon de la depostuloj, kies liston vi disvolvis antaŭ mi - ĉar vi kalkulas nek kun la diktaturo de socia kategorio nek kun la pezo de la plimultoj, ĉar restas al vi nur la eduka aŭ perekzempla propagando, la modifo aŭ la transformado de la publika opinio aŭ de la ĝenerala mensostato, - mi el tio konkludas, ke vi ne povus partopreni en iu revolucio ? Tio estas mia lasta demando.

Ni efektive ne estas akcidentaj revoluciuloj, se per "revolucio" oni komprenas subitan, katastrofan transformadon de la eksteraj vivkondiĉoj de homa medio. Tiaj transformoj - kiam ili ne sekvas preparan evoluon - nur supraĵe, netrafe efikas. Kiam kvietiĝinta la renversa deliro, kiu supraĵe agitis la diritan medion, la ĝenerala mensostato reekvilibriĝas kaj retroviĝas en proksimume la sama stato kiel antaŭ la eksplodo de la revolucia erupcio. Ni do estas permanentaj revoluciuloj : ni provas realigi unue en ni mem, en nia ĉirkaŭantaro, en niaj rilatoj kun, kaj en kompanio de niaj kamaradoj nian apartan koncepton pri la vivo - individua vivo, plurala vivo - ni provas tie trovi ĉiujn niajn kontentigojn, ĉiujn niajn ĝuojn. Ju pli la individuaj revolucioj multiĝos, des pli alproksimiĝos la instalo de revolucia stato permanenta. Se ĉio konsiderita, la ĝenerala revolucio estas la sumo de la personaj revolucioj.

Tamen, en okazo de forigo, rompo aŭ interrompo de la garantioj por la pensesprimo, por la manifestado de la opinioj kaj ties propagando, por la kunvenlibereco, por la formulado de kolektivaj aŭ individuaj depostuloj ; en okazo de malhelpoj kontraŭ eksperimentoj aŭ realiĝoj ligantaj nur tiujn, kiuj ilin entreprenas ; estas antaŭvidende, ke multaj individuistoj transformos sian normalan staton de malfido kaj sindefendo rilate la Ŝtaton, la Registarojn, la Administraciojn kaj ĉiujn aliajn truddevigajn instituciojn, en aktivan partoprenon en ĉia rezistomovado - individuaj aŭ asociitaj agoj, insurekcio, ĝenerala striko aŭ ĉiaj aliaj formoj de defendo - kontraŭ la arbitro aŭ agreso de la registoj, de la estroj aŭ ties plenumantoj.

Estas eĉ ne unu individuisto, kiu ne volas, ke plej baldaŭ realiĝu la an-arkiista Revolucio, la Revolucio kiu ebligos : 1° al ĉiuj izolitoj ; 2° al ĉiuj asocioj kaj federacioj de libervolaj asocioj ; ekzisti kaj disvolviĝi, ĉiu laŭ sia bontrovo - tiuj asocioj aŭ "unuiĝoj" estu la faro de iu personeco ĉirkaŭ kiu grupiĝas kolektivoj, aŭ faro de kolektivo al kiu kuniĝas individuoj.

E. Armand.

20an de decembro 1924.
1an de majo 1937.

Gérant & imprimeur : Baudé,F 47340 Laroque Timbaut. 58651